9-a JARO, N-o 397



LEIPZIG, 17./11. 1932

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

LA NUNA STATO DE l'JAPANAJ KAMPARANINOJ

La vivo de ĉiuj kamparaninoj jam de longe estis tiel kompatinda, ke ili estis devigataj vivi tiel mizere kiel brutaro. Plie, la pligraviĝo de l'paniko, kiu atakis la agrikulturan industrion plej forte, faligis ilin en la plej malbonan situacion. Kvankam lastatempe la prezo de l'agrikultura produkto iom kariĝis dank' al la remalpermeso eksporti oron, tamen la grado de kariĝo estas tre malgranda kompare kun tiu de industria produkto, k la malmultiĝinta bezono alportas al ili malpliiĝintan enspezon. Dume, la sumo de ilia ŝuldo por imposto, sterko k rizo pli k pli grandiĝas, k la farmrento estas senindulge postulata. Krome, ĉar ilia fratino aŭ filino, kiu antaŭe sendis monon al ili perlaborante ĉe ŝpinfabriko, silkfabriko aŭ teksfabriko en urbo, nun perdas sian laboron k estas reveninta al sia hejmo; ili ne plu povas ricevi monon de ŝi, k plie, la konsumo de manĝaĵo pliiĝas. Ankaŭ en la kamparo oni estas senlabora. Se ili havas laboron, la enspezo estas tre malmulta. Sekve, nun sur kamparanojn neeviteble falos katastrofo, ĉar ĝis nun ili nur per tiu enspezo apenaŭ aĉetadis sterkon por aranĝi sian agrikulturon k nutraĵon por subteni la vivon de siaj familianoj.

Vivmaniero.

Ĝenerale la kamparanoj havas milion, tritikon, terpomon aŭ kukurbon miksitan en rizo kiel sian ĉiutagan nutraĵon. Ili manĝas nek fiŝon nek viandon. Sukero aŭ ŝojo (japana saŭco uzata por bongustigi manĝaĵon) neniam estas uzata de ili. Ilia manĝaĵo estas ja ne pli bona ol manĝaĵo de brutaro: k virinoj manĝas nur restaĵon de tia manĝaĵo.

Ili neniel povas vesti sin per tia silka vestaĵo, kian surmetas la edzino aŭ filino de bienulo. Dum sia tuta vivo ili surmetas unu solan veston, k kiam ĝi rompiĝas aŭ eluziĝas, ili ĝin flikas por uzi denove.

Ilia domo ankaŭ estas ekstreme malbona k malsaniga. Tie ne estas ventolado [illegible] trapasas sunradio, sed ĝi estas [illegible] malsekeca kun multaj breĉoj en la muroj. Ĝi estas samtempe ilia provizejo, laborejo, manĝejo k dormejo.

Junaj virinoj esperas urĝe liberiĝi de tia malfacila kamparana vivo k edziniĝi en urbo. Sed la gepatroj ne permesas al ili tion, ĉar la manko de laboro inter ili pligrandiĝos, se la energiaj junulinoj forlasos ilin, k sekve ilia edziniĝo prokrastiĝas.

Kiam ili estas malsanaj, ili neniam povas venigi kuraciston k devas esti dankemaj, se ili povas aĉeti medikamenton, k la sola sorto permesita al ili estas nur atendi sian morton.

Labormaniero.

La plej multo el la virinoj en kamparo konsistas el malriĉaj farmlaboristinoj. Malfacila vivkondiĉo pelas ĉiun edzinon k filinon labori tute same kiel viro sur kampo aŭ en kulturado de silkvermo krom siaj ĉiutagaj domaferoj de kudrado, zorgado pri infanoj, kuirado, ktp. Sed la pliiĝanta malfacilo de la vivo, kaŭzita de la nuntempa sistemo de posedado super terpeco parazite al bienulo, k treege malgranda ŝanco en farmado, neniam asekuras ilian ĉiutagan vivon per la sola laborenspezo sur kampo. Por siaj familianoj ili penas fari taglaboron aŭ flankan laboron, tamen la laborenspezo estas senmezure malgranda.

Plej junaj knabinoj de 6 – 7-jaraĝaj ankaŭ penegas alporti, sur la ŝultroj, pajlmatojn produktitajn de siaj patrinoj aŭ fratinoj flanke de la agrikulturado, al la vilaĝo multajn metrojn inter kampoj, k helpas ilin vendi la aĵojn, kvankam la varo kostas preskaŭ nenion. Knabinoj de 9 – 13-jaraj laboras ĉe bienulo aŭ riĉulo kiel servistino aŭ vartistino, por ke ili ne konsumu rizon de sia propra hejmo. Ili ricevas neniom da pago de la mastroj. De 12- ĝis 17-jara knabino sin oferas kiel ŝpinistino aŭ silkfabrikistino por ricevi nur kvardek jen-ojn (unu jen-o estas preskaŭ 2 germanaj markoj) por sia trijara laboro, kun aldon-

---

POR „LA NOVA EPOKO“

Ne nur la vivo de nia literatur-scienca organo estos certigata, sed ni eĉ povos ĝin pliampleksigi k plibeligi, se multaj K-doj imitos jenajn SAT-anojn el Stokholmo:

11.020, 17.815, 13.559, 13.560, 13.131, 11.848, 14.090, 13.782, 16.901 k 14.565.

kiuj kolektis **270 sv. kronojn.**

Lingvo vivas ĉefa per sia literaturo; bona materialo ne mankas; senĉese venas novaj kunlaborantoj; ni donu grundon al tiuj semoj, kiuj certigas belan rikolton en la estonto.

Donacu laŭpove; varbu senlace; sendu al ni adresojn de personoj, kiujn vi opinias emaj aboni, k ni sendos al ili provekz-ojn. Agu!...

---

ita kontrakto, ke en okazo de sia retirîgo pro malsano ili devas repagi la ŝuldon antaŭe pruntitan. Tiu ĉi antaŭe pagita al la patroj monsumo por la laboro de iliaj filinoj estas tuj elspezita por pagi la ŝuldon por sterko, procentego k farmrento. Kapitalistoj tute ekspluatas la knabinojn, k en la fino, kiam ili fariĝas nekapablaj perlabori, eksuferante pro ftizo, aŭ ilia lasta energio jam elĉerpiĝis k plu ne ili kapablas utili la kapitalistojn, tiuj senkompate maldungas ilin neniom pagante. Kaj novajn freŝajn fabriklaboristinojn ili kondukas al si de la kamparanaj familioj, kiuj suferegas en la fundo de senhaveco k malklero.

Laborperejo k komisia agento ankaŭ funkcias kiel la ilo de l'kapitalisto por suĉi ĉiun forton el la kamparaninoj. Ekzemple, perejo en la urbo en la norda parto, kie oni suferegas pro la ĝenerala manko de manĝaĵo, ligas sin kun *Osaka Temma Teks-akcia Kompanio* por provizi al la kapitalistoj tiujn malklerajn kamparaninojn per la anonco „Oni varbas cent laboristinojn por savi ilin el la malsatego. La kondiĉo estas 33 senoj (50 senoj valoras ĉ. unu germanan markon) por naŭhora laboro k dekalkulo de 15 senoj por manĝo". Estas videble, ke la anonco estas trompaĵo. Per manoj de ruzaj agentoj, sennombraj virinoj nun viktimiĝas.

Aldone, avaraj kapitalistoj k bienuloj severe postulas repagon de la ŝuldo. Por pagi al ili, filinoj aŭ fratinoj de malriĉuloj k laboristoj en la kamparo devas sin vendi kiel publikaj prostituinoj, privataj prostituinoj aŭ restoraciaj kelnerinoj, k komenciĝas ilia senfine suferiga laboro, el kiu ili ne plu povas liberiĝi.

En 1929, la publikaj prostituinoj kalkuliĝis je 49 477 en 560 prostituejoj en la tuta lando, sed en la jaro 1930 ili plimultiĝis ĝis 52 117. Plimultiĝo dum unu jaro estas 3264. La enketo pri iliaj naskiĝlokoj montras, ke la plej altan gradon de la pliiĝo konsistigas tiuj el la kamparo. Ĉi tiu fakto klare montras la severiĝintan mizeron de l' kamparanoj.

En 1928, antaŭ la atako de paniko, la taga laborenspezo de l'kampara laboristino estis 1. 28 jen-o, k nun ĝi estas nur 0.87 jen-o. La laborenspezo signifas ilian solan k la plej gravan enspezon. Ĉar ĝi malaltiĝas tiel rapide, nun tio minacas ilian vivon. Ne nur la pago malmultiĝas, sed ili eĉ ne povas trovi laboron. Kamparaninoj nun elmetas sin al malsato pro manko de laboro, aŭ pro plena senlaboreco.

En julio 1932. *Stelaro.*

EPIDEMIO DE KONFERENCOJ.

Konferencoj, konferencoj k ree konferencoj! . . .

Jam antaŭ la milito tiu ĉi epidemio ŝoviĝis en la kapojn de l'difavorataj elektitoj, sed post ĝia finiĝo ĝi alprenis tian teruran grandon, ke tute konfuziĝis la cerboj k la makzeloj de l' malnovaj k honestaj diplomatoj. Ekkrakis la telegrafoj, ekzumis la telefonoj, ekaperas fajraj artikoloj en la ĵurnaloj k „la grandaj ŝtatistoj" surmetas siajn oficialajn kostumojn, kun tedo de aktoro, kiu multfoje estas ludinta unu k la saman rolon. Kaj jen la politikaj maljunulinetoj kolektiĝas por klaĉadi, mensogadi k cerbumadi — konference. En la blindige brilantaj salonegoj, glate razitaj fizionomioj faras al si mem gravan mienon, la pozo estas severe etiketa, la gestoj pezaj, pli pezaj ol la krimoj, kiuj estas planataj ĉirkaŭ la verdaj tabloj.

„Nia popolo" . . . komencas ĉiu, „nia popolo" — finas ĉiuj. Je kosto k je la nomo de tiu „nia popolo", kiu diversokaze konsistas el angloj, irlandanoj, hindoj, egiptoj, aŭstralianoj, ktp. estas tondataj, subskribataj k nuligataj miloj da kontraktoj k decidoj. Kiuj neniam partoprenis militon, tiuj kaŝite malantaŭ sia ora kiraso de privilegia stato, minacas per la forto de sia glavo. Kiuj neniam eĉ generon semis, tiuj ploras pro la ruinigitaj kampoj; kiuj malsupren iras la nigrajn ŝaktojn de l'minejoj nur tiam, kiam la kinoaparato devas foti „la grandan ŝtatiston inter la popolo" — ili desegnas la landkarton k ne permesas, ke „iliaj" minejoj estu deprenataj. Tamen kune kun la nure komercistaj negocoj, ĉe la konferencoj estas pridiskutataj ankaŭ moralaj, noblaj kontraktoj. En HAGO oni kunvenas por difini, kiuj mortigrimedoj estas humanaj k laŭ kiu paragrafo povas esti amputita unu hombrako, tiel ke la moralo restu ne vundita. Ĉe la verdaj tabloj en VERSAJO (VERSAILLES) oni ĵetas grandanime la demandon, kiom da kubmetroj da aero devas resti al la venkitoj, por ke ili ne mortu tuj pro asfiksio. Kaj en VAŜINGTONO la diplomataj bopatrinoj decidis, ke ili nenion povas decidi. —

La vortoj estas por la diplomatoj ne rimedoj por esprimi la pensojn, sed por kaŝi ilin, — diris iam iu ŝtatisto. Kaj alia aldonis: „Ni, la diplomatoj, kunveninte, tiel aĉege k malkaŝe mensogas unu la alian, ke ĉiuj rideksplodus, se ni ne estus bone edukitaj homoj".

Vere, edukitaj homoj! Bone vestitaj, bone nutritaj, parfumitaj, zorge kombitaj — sidas ĉe la verda tablo, taŭzas la senfinajn fadenbulojn de siaj sensencaj paroladoj k balancas pezegrave siajn malpezajn kapojn, en la sama tempo, kiam en Anglio, Ameriko, milionoj da senlaboruloj vagadas kun manoj en la poŝoj, kiam en Germanio multaj mortas pro malsato, en Aŭstrio oni konvulsias pro mizero. Jen rigardu ilin hodiaŭ kunvenantaj en Kan (Cannes), morgaŭ ili direktas sin al Genovo. Varmegaj impulsoj el glaciaj koroj, oraj promesoj el farizeaj buŝoj, grandaj planoj de malgrandaj animoj. Akvo-falo el inko, montoj el papero, oceano el malplenaj vortoj! k sur ĉio ĉi staras unu ordinara, granda nulo.

Konferencoj, konferencoj, k ree konferencoj! . . . Trans oceanon k montegojn venas diplomataj vulturoj, trans oceanon k montegojn revenas plenuminte nenian utilan laboron. Revenante, ili sin demandas: kial ili venis konante jam antaŭe nian malkapablon? Kaj ĉiuj ĉi konferencoj rememorigas pri jena anekdoto:

— Iu anoncis en ĵurnalo, ke li bezonas serviston, scianta francan lingvon k ĉevalstriglon. Iu legis la anoncon k direktis sin al la anoncinta bienulo.

— Ĉu vi scipovas la francan lingvon?

— Mi ne scipovas.

— Kaj strigli ĉevalojn?

— Ne, ankaŭ tion mi ne scipovas.

— Kial do vi venis?

— Mi venis por diri al vi, ke mi ne povas fari la de vi postulatan laboron.

Tiel respondas al la kriantaj bezonoj de l' hodiaŭa vivo la stultaj diplomatoj de l' kapitalista sociordo.

K. H. (17 635).

Por ŝtopi la breĉon

18. listo.

16664	Wijn C. (Hilversum)	mk. g.	—.98
	Lindental- k Magdeburganoj	mk. g.	1.76
13389	Thieme (Leipzig)	mk. g.	—.75
	Profito el ekskurso de la Roterdamaj k Hagaj K-doj	g.	1.15
16916	Kouril (Tluĉna)	kr. ĉ.	5.—
18057	Schneider (Brunsvigo)	mk. g.	1.—

Faŝistaj provokoj en Vieno

Atako al laborista hejmo.

La 16-an de oktobro antaŭtagmeze la naciistoj (faŝistoj) manifestaciis en la distrikto *Simering* (11-a distrikto de la komunumo Vieno); tiuokaze ili interpuŝiĝis kun la socialistoj. Unue estis reciprokaj insultoj, poste la faŝistoj komencis ĵeti ŝtonojn k bati per ŝtalvergoj. La atakitoj, pli malmultnombraj, retiriĝis al la proksime lokita Laborista hejmo. La faŝistoj pafis al la rifuĝantoj k rezulte mortpafis unu policanon, kiu volis forpuŝi ilin de la Laborista hejmo. Tiu policano estis jam depost multaj jaroj socialisto k amiko de la laboristaro. En la Laborista hejmo troviĝis 200 „ŝirmliganoj" (socialistaj) en alarmstato, k kiam ili

aŭdis la pafadon, ili enlasis la persekutatojn k respondis per pafoj. La tri ĉeestantaj policanoj helpopetis telefone, k post kvaronhoro aperis 60 policanoj en atakaŭtomobiloj k atakis la Lab. hejmon. Ĉar la ŝirmliganoj ne tuj malfermis la pordon, la policanoj detruis ĝi lastan per peza ĝardena benko.

60-jara socialista distrikt-konsilanto Medved, kiu volis malfermi la pordon, ricevis ĉekape sabrobaton de la enĵetiĝantaj policanoj. Per gumbatiloj la policanoj batis la kun manoj levitaj starantajn k arestis ĉiujn, kiuj ne forkuris. En ŝtuparo k koridoro la arestitoj estis bategataj tiele, ke oni povis aŭdi la vekriojn en la tuta ĉirkaŭo.

La policanoj traserĉantaj la domon trovis kelkajn manarmilojn, revolverojn k 70 fusilojn, kiuj tie estis konservitaj por la defendo en okazo de atako. Per hakiloj k pioĉoj la traserĉantoj krevigis pordojn, ŝrankojn k skribtablojn. Bildojn k horloĝojn oni ŝiris de la muroj k frakasis per la botkalkanumoj, telefonaparatojn oni ĵetis teren k detruis, same la bustojn de eminentaj socialistoj, oni forŝiris fenestrajn kornicojn k masonaĵojn, hejtotubojn, gasfornojn. Oni malfermis perforte la plankon k dispecigis la linoleumon. Tiuj uloj kondutis pli terure ol dum la milito en „malamika lando“.

La gazetaro kriegaĉis pri la malbravaj socialistoj (estis ja mortigitaj du faŝistoj k kvar estis grave vunditaj, 57 ŝirmliganoj estis arestitaj), sed ĝi silentis pri tio, kiel la faŝistoj mortigis la socialistojn Birneker, Stil, Kovarik, Mueler k plurajn aliajn. Ili kriaĉis, ke la leĝa ordo endanĝeriĝis en Simering. La „puĉo“ (ribelprovo) de l'monarkistaj „hejmdefenduloj“ en sept. 1931 estis tute aliproporcia endanĝerigo de l'leĝa ordo, sed ĉiuj krimuloj de l'puĉo restis nepunitaj! El la samideanoj de tiuj krimuloj oni faris ministrojn k ŝtatsekretariojn. Tiel aspektas egala rajto por ĉiuj k justo en Aŭstrio.

L. Stejnbaĥ (16 927).

Fruktoj de l' lerneja faŝistigo.

Ĥemia profesoro de mezlernejo vizitis kun siaj lernantoj la gasfarejon por doni senperan objektan instruon pri modernaj ĥemiaj procedoj ĉe la karb-prilaboro. La bedaŭrinda konflikto inter hejmo k lernejo elmontriĝis per la fakto, ke kelkaj buboj disĵetadis en la korto k laborejo paperajn hokokrucojn (ĉi tie jam kutima, ridinda propagandmetodo). La laboristoj baldaŭ rimarkis tion; ili ofendiĝis pro la impertinenta atenco kontraŭlaborista k postulis senprokraste forigi la nedeziratajn gastojn — aliel ili ĉesus labori. Tiel okazis. La lernantoj devis foriri, ne fininte la studadon.

Laŭ „Laborista Gazeto“ (Vieno)
J. Denes (17 418).

Letero el Norda Afriko.



La moskeo de la paŝao en Oran.

2.[1]

La tri klasoj de araboj.

Oni povas dividi la arabojn je tri klasoj. La unua estas la tielnomataj „kaid“-oj, tre riĉaj sinjoroj reĝe vivantaj en grandaj palacoj k posedantaj luksajn haremojn kun multaj virinoj. Ili havas sufiĉe da mono por aĉeti tiom da edzinoj, kiom ili deziras, edziĝante kun ili laŭ arabaj moroj.

La edzino povas esti aĉetata 14-jara al la gepatroj. Sed la edziniĝo okazas en la 17-a jaro. La edzineto povas esti aĉetata per mono, ĉevaloj, kameloj, ktp.

Tiuj reĝetoj havas ĉiujn facilojn por vivi bone k gvidi la araban popolon, kiu blinde obeas al tiuj ĉi sinjoroj. La franca registaro havas tiel ilon en manoj por restigi obeema la araban popolon, sub la subpremo de tiuj sinjoroj. La popolo restas kvazaŭ sub feŭda regado, kiel en pasintaj jarcentoj en Eŭropo.

La araboj malmulte interesiĝas pri la sociaj bataloj. Ili blinde obeas al la reguloj de vere fanatikiga religio k restas tiel sklavigitaj. Neniaj publikaj arabaj bibliotekoj ekzistas. Al la popolo plaĉas nur la religiaj ritoj, kantoj, preĝoj farataj de „sanktuloj“ (= pastroj) en stratoj k placoj. Tiuj ĉi sanktuloj vivas per donacoj ricevataj de l'araboj. Kelkaj el ili kunportas venenajn serpentojn en sakoj k dancigas ilin per flutludo sur la placoj. Dekoj da gearaboj restas starantaj k rigardas mirigite tian ludon. Ili tre ŝatas preĝi kun tiuj „sanktuloj“, kiuj havas la povon de dio donitan por ensorĉi la bestojn, ne ricevante venenan mordon de la danĝeraj reptilioj.

Estas aliaj „sanktuloj“, kiuj havas la povon sanigi, ili vendas arabajn religiajn afiŝojn, amuletojn ktp. Ili kunportas strangajn muzikilojn, ludas k kantas sur placoj k ricevas donacojn de la fideluloj. Muziko k arabaj kantoj estas similaj al la hispanregionaj kantoj k ekz. tiuj en Argentinio; estas belsentimentaj melodioj. La francoj tre respektas tiujn kutimojn, k tiel la araboj ne havas la intereson por plibonigi sian mizeran situacion. —

La dua klaso estas la bienposedantoj, komercistaj riĉuloj ktp. Ili havas specialan kulturon, sed estas tre religiemaj. Ĉiuj parolas bone la francan k hispanan lingvojn, krom araba dialekto.

Ili havas rajton por prezenti sin kiel membrojn de la urbmagistrata konsilantaro. Sed povas esti elektata nur malgranda parto. Ekzemple, se la konsilantaro estas formata el 15 francaj membroj, rajtas enesti 5 araboj. En tribunalaj aferoj la juĝado estas farata de francoj.

La ejoj, kie la araboj parolas pri siaj aferoj, estas specialaj arabaj trinkejoj. Tie mi trinkas teon en multaj tagoj, k tre plaĉas al mi, ĉar tie ne estas alkoholaĵoj; nur ekzistas teo k akvo. En tio oni superas la eŭropanojn. Preskaŭ ĉiuj tie sidas sur tapiŝoj sur la planko, ĉirkaŭante malgrandajn tablojn, kie staras glasetoj kun teo. Aliaj ĉirkaŭas grandajn tabakpipojn kun longaj gumtuboj, suĉante la aromon de fumtabako; ĉiuj babiladas pri siaj aferoj, poste aŭdiĝas gramofono kun arabaj melodioj, regionaj kantoj k c, k el tio, ke ĉiu streĉatente aŭskultas, vidiĝas, ke oni ŝatas la kantadon.

En la sama momento oni vidas pasi sur la strato procesion el multaj gearaboj; temas pri araba edziĝ-festo. Antaŭ la procesio marŝas muzikistoj, kiuj bele muzikas ludante ĉefe regionajn kantojn. Ĉiuj rigardas ĝoje, k ĉio estas dediĉata al la geedzoj. La promenon partoprenas nur la edzo k familianoj; multaj el ili vestas sin laŭ eŭropa modo k portas en la manoj grandajn lumigilojn, kiuj heligas la tutan straton trapasatan. Aliaj ĵetas en la varman afrikan noktan aeron parfumojn, brilajn arabajn odor-lumaĵojn, la edzo salutas ĝoje al ĉiuj. Li jam posedas du edzinojn k baldaŭ havos trian.

Mi sekvas la procesion ĝis la hejmo de l'geedzoj. Tie pendas grandaj lumiloj bonvene al la kunvenantoj. Unue ni eniras grandan salonon, kie sur la muroj pendas belaj arabaj tapiŝoj; similaj kuŝas sur la planko. La domo estas plena de gearaboj k eŭropanoj, kiuj lastaj tion rigardas kun granda miro; la arabinoj surportas belajn blankajn k silkajn vestojn k kovras la vizaĝon, rigardante nur tra mallarĝa

[1] Vd. ankaŭ la n-on 395.

fendo per siaj nigraj okuloj. Nazo k buŝo ĉiam restas kovritaj antaŭ la rigardantoj. Kelkaj nigraj araboj de l' suda regiono (Saharo) surhavas grandajn orelpendaĵojn k en la nazo orajn ringojn. Sed tiuj kutimoj jam perdiĝas.

Ĉiuj vizitantoj estas invitataj manĝi iom da speciala araba manĝaĵo nomata „kuskus"o. Ni rifuzas manĝi tiun ĉefan araban manĝaĵon k ĉagrenas tiel niajn gastigantojn. Sed oni prezentas al ni fruktojn, vinberojn, melonojn, figojn, ktp, k oni ĝojas, ĉar ni iom da ili manĝas k tiel honoras la feston.

La edzo eniris ĉambreton kun la edzino k ĉiuj atendas lin; post horo li eliras ravite, ĉar li povas pruvi, ke la edzineto estis virga. Kiel pruvilon li montras al la familianoj sangan litotukon de l'junulino. Se la edzino ne estis virga, li havas rajton redoni ŝin al la gepatroj.

La tria klaso da araboj estas la mizeraj laboristoj, kiuj estas devigataj ĉiam obei la aliajn; ili troviĝas sub la jugo de l' bienposedantoj, de kiuj ili estas ekspluatataj; ili drinkas alkoholon k vestas sin kiel almozpetantoj. La bestojn buĉas la „sanktuloj" (pastroj), ĉar ili kredas, ke per sia povo ili forpelas la bestmalsanojn. La viando, kiun la araboj malŝatas, estas tiu de l'porko. Se ili laboras kune kun eŭropanoj k flaras dum la manĝado la porkaĵon, ili foriras k manĝas aparte. Dum vintro ili tutan monaton vivas faste k manĝas nur, kiam noktiĝis, dum ses horoj; dum la tago ili laboras, sed ne manĝante, nek fumante.

Ĉe la fino de l' granda fasto oni aranĝas solenajn festojn, ĉefe distingitajn per surĉevala rajdado kun pafiloj, dum kiu ili pafas lerte aeren. Miloj da gearaboj rigardas la ludojn k aklamas laŭte, kiel en Hispanio dum la bovobataloj.

Mi ankaŭ vizitis iliajn preĝejojn ornamitajn per granda turo. Kiam mi eniras, la pastro petas min franclingve demeti la ŝuojn antaŭ la pordo, k mi eniras nudpiede kiel la aliaj. En la interno jam estas granda amaso da fideluloj, kiuj preĝas fervore kun la kapo klinita sur la plankon. Subplafone pendas belaj lampoj, sur la muro diversaj tapiŝoj, k tra malgrandaj fenestroj nur penetras la suna lumo. La pastro montras al mi belajn arabajn standardojn kun insignoj de „sanktuloj", kiuj defendis la araban popolon kontraŭ la premo de malamikoj en antaŭaj jarcentoj. En aparta ĉambreto kuŝas montoj da vaksaj kandeloj, donacataj de malsanaj fideluloj, kiuj dum sia suferado preĝis al dio k ricevis la sanon, k kiel rekompencon k memoraĵon ili donis al la preĝejo tiujn donacojn.

Oni invitas min suriri la altan turon, de kie la „sanktulo" alvokas la fidelulojn. De tie oni vidas tre bele la tutan pejzaĝon kun la arabaj dometoj tiel diferencaj de eŭrop-urbaj domoj. Ili estas tre malgrandaj k blankaj kiel neĝo. La urbeto ŝajnas farita kiel amuzilo por infanoj, k de la alta turo rigardate la araboj ŝajnas blankaj pecetoj da neĝo, kiuj amike ludas kune en la mallarĝaj stratoj.

Kontraŭ antaŭa pago

ni liveras *nur al niaj membroj k abonantoj* jenajn librojn kun eksterordinara prezredukto.

La afranko estas entenita:

Dancu marionetoj, simple bind.	mk. g.	1.50
Viktimoj, broŝ.	mk. g.	2.–
Tragedio de la homo, broŝ. .	mk. g.	1.50
Pilgrimo, broŝ.	mk. g.	1.–
Eŭgeno Onegin, simple bind. .	mk. g.	1.50
Intern. Infanaro, bind., k. bild.	mk. g.	1.50
Teorio de Esperanto, de Varankin	mk. g.	1.50
La Kvinjaro de Sovetlandoj .	mk. g.	1.–
Vortaro de Kabe, bind. . .	mk. g.	1.50
Vortaro, esperanto-pola, broŝ.	mk. g.	–.80
Kompleta Gramatiko de Esperanto, broŝ. . .	mk. g.	2.50
4 libretoj el la „Komunista Biblioteko", kune	mk. g.	–.50

Krome ni rekomendas la eldonaĵojn de
INTERNACIA SOCIA REVUO

Tre facile legeblaj por progresintoj k lernantoj (antaŭmilita literaturo); pro la malalta prezo oni povas komune legi en kursoj por komencintoj:

Pri la esenco de konstitucio, parolado de F. Lasalle, 30 pĝ.	mk. g.	–.15
La piramido de tiranio, de F. D. Nieuwenhuis, 32 pĝ.	mk. g.	–.15
La reforma mono de Silvio Gesell, parte orig., 48 pĝ. .	mk. g.	–.20
Por ataki k defendi, parolado de W. Liebknecht, 32 pĝ. .	mk. g.	–.15
La salajro, de P. Kropotkin, 22 pĝ. . .	mk. g.	–.10
La mizeruloj (I), de V. Hugo (fama verko), 248 pĝ. . . .	mk. g.	1.–
La forto de la fortaj, de J. London, 20 pĝ. . . .	mk. g.	–.10

Administracio de SAT, Kolmstr. 1, Leipzig O. 27.

Antaŭ la noktiĝo mi vizitis la araban urbeton, kie troviĝas placeto, la ejo de l'arabaj komercistoj kun multnombraj butikoj, kie oni proponas al la riĉaj vojaĝantoj tapiŝojn, silkajn kovraĵojn, vestojn, ktp. En la centra placo troviĝas razejo sub sunkovrilo; la razisto havas kapon razitan kun bela nigra barbo, li razas ankaŭ la kapon, eltiras dentojn k sangon. Ĉi lasta operacio estas farata ĉe la genuoj aŭ apud la oreloj. Unue li tranĉas per la razilo iomete ĉe la genuoj, poste almetas tubetojn, helpe de kiuj li kaptas la sangon per sia propra buŝo; la araboj kredas, ke tiu sangeltiro restigas la korpon sen malsanoj.

Dum mi tien promenas, preterpasas araba enterigo. La mortinton oni portas sur portilo kovrita per litotuko. Ĉiuj familianoj kantas religiajn kantojn, neniu ploras. Mi sekvas ilin ĝis la tombejo, kie atendas aliaj parencoj de la mortinto. Ĉiuj restas antaŭ la foso, en kiun devas esti metata la kadavro. Tre dolorige k impone estas vidi multajn fratinojn k edzinojn de l'mortinto tre laŭte voki k per la ungoj ŝiri siajn vangojn k fluigi la sangon. Tio estas farata kiel pruvo pri amo k sentata doloro. Ĉiuj estas invitataj manĝi, antaŭ ol estas metata la kadavro en la foson. Ni ricevas panon k figojn, k estus tre ĉagrene por la funebrantoj, se iuj rigardantaj personoj rifuzus ilian manĝproponon.

Post manĝo k preĝoj ili ĉirkaŭas lige la mortinton per litotuko k malsuprenirigas lin en la foson kune kun kelkaj manĝaĵoj, da kiuj ili ankaŭ ĵetas sur lin. Poste la tombon ili kovras per longa ŝtono. En arabaj tombejoj ne ekzistas muroj; promenantoj povas libere aliri la tombojn. Kelkaj floroj estas dissemitaj sur la teraj tomboj.

Daniel Pons (15 316).

Nombroj parolas

1. En kapitalistaj landoj loĝas jena kvanto da kontraŭsovetiaj rusoj: Francio: 400 000, Germanio: 60 000, Rumanio: 70 000, Manĉurio: 200 000, Britio 3000.

2. Komence de oktobro prezentiĝas jena kvanto da senlaboruloj en la tuta mondo:

Britio	2 854 790
Usono	12 000 000
Aŭstralio	118 732
Kanado	35 191
Novzelando	46 191
Irlanda t.n. „Libera" Ŝtato	30 918
Germanio	6 041 371
Aŭstrio	361 222
Polio	325 782
Belgio	228 288*

3. Usona ĵurnalo *La Vaŝingtona Poŝto* donas nombrojn pri promilitaj elspezoj en pluraj landoj, en 1930:

Britio	608
Francio	507
Italio	322
Polio	123
Rumanio	47
Jugoslavio	47

En la sama jaro Japanio elspezis 240 milionojn da dolaroj k Usono 709 milionojn. – Tiuj nombroj estas ĉerpitaj el *La Ĉiutaga Laboristo* (brita kompartia ĵurnalo).

Kaj en tia situacio oni kunvenas en Ĝenevo, Lozano ktp. por parolaĉi pri paco!! Ni esperu, ke la antaŭnelonga kontraŭmilita konferenco en Amsterdamo estas pli fidinda ol la aliaj. Dum kapitalistoj parolas pri paco, ili samtempe preparas militon. Eĉ la delegitoj estas akciuloj en armilfabrikoj.

M. Sampson (4691)

* Pluraj landoj kun konsiderinda senlaboreco ne estas entenitaj en ĉi tiu statistiko! – *Red.*

La mizero de l'senlaboruloj en Germanio

Laŭ *oficiala* statistiko de l'Regna Statistika Oficejo estis dum *aŭgusto* anoncitaj senlaboruloj:

Spertoj de patro, kiu sendis siajn infanojn en mez- k altgradajn lernejojn.

Ĝenerale laboristaj gepatroj aspiras laŭeble havigi al siaj infanoj pli bonan ekonomian pozicion, ol ili mem povis akiri. Por tiu celo ili ofte oferas pli, ol konformas al ilia propra situacio. Se ne en ĉiuj, tamen en plej multaj kazoj la infanoj tute ne konscias, per kiaj oferoj de la gepatroj ili akiris sian bonpagatan oficon. Ĉio estas akceptata kiel natura procedo, al kiu la gepatroj leĝe k morale estas devigataj. Kaj ofte okazas, ke el la infanoj, kaŭze de la lerneja edukado, vere ne fariĝas kunbatalantoj por niaj ideoj, sed aŭ tute indiferentaj burĝoj, aŭ eventuale eĉ kontraŭuloj. Estas tre ĉagrene, tion devi konstati, tamen ĝi ne estas aliigebla.

Antaŭ 12 jaroj mi sendis mian plej aĝan filinon post 8-jara vizito al popollernejo en mezgradan lernejon por virinaj profesioj, en kiu ŝi restis 3 jarojn. La kelkajn jarojn antaŭe okazinta revolucio donis ja ankaŭ al ne-bonstatuloj la eblon sendi per ŝtatkostoj siajn infanojn en altgradajn lernejojn, se la lernantoj per konduto k lernemo prezentis sufiĉan garantion. En la komerca fako, kiun mia filino vizitis, ŝi troviĝis inter knabinoj el tipe burĝaj familioj. Sed neniel ŝi lasis sin influi de la aliaj k persistis obstine en sia proleta starpunkto. Tiun ŝi ankaŭ okaze defendis kontraŭ kunlernantinoj k eĉ instruistoj. Kiel ano de progresema junul-organizo ŝi restis fidela al niaj ideoj ankaŭ dum la sekvintaj 3 jaroj, dum kiuj ŝi laboris k vivis en burĝa familio de alia urbo. Ankaŭ la eklezion ŝi estis eksiĝinta.

En 1926 ŝi revenis hejmen kiel 21-jarulino. Post kelkaj monatoj mi konstatis iom post iom aliformiĝon de ŝiaj ideoj. Ŝi forlasis la junularorganizon, en kiu ŝi iam estis unu el la plej entuziasmigitaj k aliĝis denove la eklezion. Kelkajn jarojn ŝi jam estis partianino. Sekvis ŝia eksiĝo, kiun mi mem prizorgis por eviti postajn riproĉojn. Mi tute ne volis, ke ŝi nur pro mi restu en la partio. Pli k pli burĝiĝinta ĉiurilate, mi perdis ĉiun kontakton kun ŝi tiagrade, ke ofte dum pluraj semajnoj ni eĉ ne interŝanĝis unu vorton krom la ĉiutaga saluto. Multe mi suferis sub tiu ĉi stato. Kaj la kaŭzo de tiu konvertiĝo estis — la fianĉo, kiu vizitis tiam la unversitaton k kies edzino ŝi fariĝis antaŭ unu jaro.

Ankaŭ la duan filinon mi vizitigis dum 3 jaroj la komercfakon de la supre menciita lernejo. Kvankam ŝi ankaŭ iam estis en proleta infanorganizo, ŝi tamen neniam montris veran intereson por la ideoj de la junularorganizo. Kontraŭe al sia fratino, ŝi en la lernejo imitis ĉiurilate la burĝajn kunlernantinojn. Konsiderante ŝian karakteron, mi ne surpriziĝis pri tio, k vole aŭ ne mi devis ĝin toleri. Ankaŭ hodiaŭ, en sia 20-a jaro, ŝi montriĝas tute indiferenta al la laborista movado. Neniam ŝi klopodis esplori, kial la patro tiom fervore defendas k partoprenas la lab. kultur-, sindikat- k politikan movadon. Kontraŭe, ofte ŝi kritikas malaprobe konatojn el la partio, la proletan gazeton k la tutan movadon. Do, konforme al miaj socialistaj principoj, mi evitas ĉiun ajn devigon por ŝin konduki al alia starpunkto. Eble mi atingus per tio nur la malon. Ŝi estas ano de lab. sindikato, sed neniam vizitas ĝiajn kunvenojn. Kontraŭe al sia fratino, ŝi restis ĝis nun ekster la eklezio.

Temas nun pri la tria infano, knabo, kiu ankaŭ estas 20-jara. Jam depost sia deka jaro li vizitis reallernejon. Poste li estis 3 jarojn en supera reallernejo. Liaj atestoj estis ĉiam tre boncenzuraj. En printempo de l' lasta jaro stariĝis la demando pri taŭga ofico por li. Ĉe multaj estraroj, poŝta, fervoja, administra ktp. ĉiu klopodo restis senrezulta. Ankaŭ privataj institucioj ne montris pli bonan aspekton en la nuna kriza situacio. Tial mi decidiĝis, vere kontraŭvole, sendi lin por tri jaroj en pedagogian altlernejon, por ke li iam fariĝu popollerneja instruisto.

Same kiel lia samaĝa fratino, la knabo estis iam en proleta infanorganizo. Sed pro multa lerneja laboro k pro tio, ke li krom tio depost la 10-a jaro tre fervore ludas violonon, li forlasis la organizon. Vizitinte dum kelkaj jaroj lab. sportunuiĝon, li montris ĝis la 15-a jaro viglan intereson por la laborista movado. Kvankam li nun ne plu estas ano de iu ajn organizo, li daŭre informiĝas pri politikaj okazintaĵoj. Sed mankas ĉia aktiveco. Lin tedas ŝajne la tuta politiko. Ofte ni disputas pri la socialistaj ideoj, kiujn li ŝajnas aprobi. Akre estas kritikataj de li ĉiuj partioj k ne lastavice la laboristaj k precipe mia. Sed mi ne volas lin instigi al aktiva kunlaboro, kiun li certe ankaŭ rifuzus pro sia jama okupiteco. Mi tamen fidas iagrade al li, esperante, ke li iam partoprenos nian liberigan batalon, k ne fariĝos burĝo. Ĉu mi ne iutage estos disreviĝinta, tio estas hodiaŭ ankoraŭ ne sciebla. La altlerneja instruistaro same kiel la plimulto el la lernantaro malsimpatias al la lab. movado k tia konstanta influo povas facile alipensigi junulon.

Entute estas tre malĝojige por mi vidi tian rezulton. Nepre mi atribuas la kulpon pri tio al la lerneja medio. Kvankam tio ne ŝajnas ĝusta rilate al la plej aĝa filino por la lerneja tempo mem, ŝi verŝajne hodiaŭ estus pensanta aliel, se ŝi depost la popollerneja tempo estus perlaborinta la vivrimedojn en fabriko, magazeno aŭ alia metiejo. Tie ŝi pli bone ol en la nuna bonpagata ofico estus spertinta la ekspluatsistemon. Kaj tiam ŝi ankaŭ ne estus trafinta en tiujn burĝajn rondojn, kiuj kaŭzis ŝian konvertiĝon. Antaŭ 12 jaroj, kiam mi intencis sendi ŝin en altlernejon, mi pritraktis la aferon kun sampartia urba deputitino. Tiu ĉi K-dino, ŝajne spertinta samon pri la propra filo, avertis min. Sed mi tiutempe ne kredis, ke okazus same al mi.

Necesas ankoraŭ mencii apartan cirkonstancon. Mia edzino, kvankam depost jaroj partiano, nepre evitas influi la infanojn per niaj ideoj. Ŝi postulas plenan liberon en tiuj demandoj por ĉiu persono. Mi havas alian opinion, sed ne povas ion entrepreni sen la patrina aprobo k subteno. Tial la infanoj ĝuas plenan liberon. Tion ja postulas ankaŭ niaj socialistaj principoj. Kaj el tia libero sekvas, ke niaj infanoj fariĝas indiferentuloj aŭ eĉ kontraŭuloj. Pli k pli larĝiĝas interfremdiĝo inter mi k miaj infanoj, k la tuta familia kunvivado estas malbone influata.

Sendante la infanojn en tiajn lernejojn mi celis fari el ili tiom pli bonajn kunbatalantojn. Sed la burĝa medio, en kiun ili tiel penetris k kiu prezentas al junuloj multe da logaĵoj, kies ne plej malgravaj estas oportuno k nebatalemo, rabis al mi miajn infanojn.

Danka mi estus, se iu K-do povus doni konsilon en ĉi tiu afero.

Ĉagrenita patro el Germanio.

	1932	1931	1930
sume	5225 mil.	4215 mil.	2883 mil.
por la senlab. asekuro	13%	31%	52%
kriza „bonfarado“	25%	26%	15%
ordinara „bonfarado“	39%	27%	16%
nenian subtenon ricevis	23%	16%	17%

Nombroj, kiuj evidentigas la plimiziĝon de l'germania proletaro de jaro al jaro, de ŝtupo al ŝtupo. Inter la 23 % (1932) da nesubtenataj senlaboruloj troviĝas ĉefe junuloj, kiujn la reakcia registaro nun devigas partopreni la „libervolan laborservon“. Jam la militistaj rondoj preparas sin por transformi tiun servon al „deviga laborservo“ — bazo de l'nun ankoraŭ malpermesata nemetiula armeo. Nuntempe la libervolan laborservon gvidas eksoficiroj k faŝistoj.

La „bonfar“-subvencioj estas ekstreme malaltaj k dependas de la bonvolo de l'koncernaj ŝtatoficistoj. Tutaj familioj malsatas depost jaroj, ne havante eĉ ŝancon iam retrovi laboron. Admiron meritas tamen la solidaro, kiun praktikas senlaboraj Gek-doj dum strikoj: ili ne iĝas strikrompantoj.

Ulo.

SENNACIULA PEDAGOGIA PAĜO

Redakcia adreso: K-do Simon Aarse, ĉe Landfelt, Râstengatan 15, I, Sundbyberg, Svedio.

Rilatoj inter eklezio k lernejo diverslande

Jam tuŝinte la staton de la instruado en Holando, ni nun donas superrigardon en diversaj landoj rilate tiun problemon, kies gravo en la nuna fazo de l'internacia klasbatalo al mi ŝajnas granda.

En **Holando** ekzistas publika ŝtata lernejo k privata. 62 % el la instruado estas privataj, plene subtenataj el la ŝtata k komunuma kasoj. Preskaŭ la tuta privata lernejaro dependas de la eklezio. Nur kelkaj neŭtralaj k protestantaj lernejoj estas liberaj k estas regataj de la gepatroj.

En la katolikaj lernejoj rajtas ankaŭ instrui monaĥoj k monaĥinoj. Ilia salajro fluas aŭtomate en la kason de la monaĥejo. Per tio la katolika eklezio gajnas jare 10 milionojn da guldenoj el la publikaj kasoj.

La publika lernejo estas senreligia. Laŭleĝe la publiklerneja instruisto ne rajtas doni religian instruadon. Gepatroj, kiuj postulas por siaj infanoj religian instruadon, povas akiri da ĝi maksimume unu lecionon dum la regula instrutempo. Praktike tio malmulte okazas.

En **Germanio** estas en diversaj subŝtatoj diversaj reguloj. Tamen multo estas komuna. Ĝenerale ekzistas la ŝtata lernejo kun religi-instruado. Kelkŝtate estas komunlernejoj kun disigita religia instruado, aliŝtate ekzistas ŝtataj lernejoj kun unu religio. La fondo de privatlernejoj estas permesata nur, se la infannombro estas tro malgranda.

En Germanio estas 52 320 publikaj lernejoj, el ili 28 570 protestantaj, 15 216 katolikaj, 121 judaj k 8 413 miksitaj. Krome ekzistas 675 privataj lernejoj. Lastatempe multaj gepatroj ne deziras plu por siaj infanoj la religian instruadon k skribe esprimas tion. Tiuj infanoj estas kolektataj en apartaj lernejoj senreligiaj, kie instruas plejparte socialistaj instruistoj. En 1922 vizitis 8 894 486 lernantoj la ŝtatan lernejon, en 1926 nur 6 629 779 lernantoj pro naskomalpliiĝo dum la milito. Ankaŭ la privata lernejaro malpliiĝis. En multaj kazoj la privatlernejoj ricevas ŝtatan subtenon, precipe religiaj lernejoj de malplimulto en iu ŝtato.

En **Anglio** la subvenciataj lernejoj estas dutipaj: tiuj, kiuj estas tute estrataj de la lokaj estraroj k tiuj, kies konstruo apartenas al la lernejestraro. Ĝis 1902 la estraroj ankaŭ respondis pri la religia k nereligia instruado. Post 1902 ilia kontrolado estas etigita ĝis la zorgo pri la konstruo, la kontrolo pri la religi-instruado k elekto de l'instruistoj.

La ŝtataj inspektoroj kontrolas la nereligian instruadon. La religia instruado okazas en publikaj k privataj lernejoj. Por faciligi la nepartoprenon en tiu instruado, ĝi estas donata komence aŭ fine de ĉiu instrutempo. La nombro da nepartoprenantoj estas tre malgranda. Laŭleĝe en la publikaj lernejoj estas malpermesate instrui kateĥismon aŭ religidogmojn, apartenantajn al specialaj religioj.

La ŝtataj estroj decidas pri la religiinstruado, sed praktike en ĉiu publika lernejo ekzistas tia instruado; do ĝi ne estas konsiderata kiel la malpermesita dogmaro.

Privataj asocioj k religiaj sektoj rajtas fondi lernejojn. Depost 1902 la ŝtato pagas ĉion, escepte la kostojn por la ejo. En 1903 estis 5 975 publikaj lernejoj kun 3 065 169 da lernantoj, 14 238 privataj kun 3 722 317 da lernantoj. En 1919: 8 621 publikaj lernejoj kun 4 329 252 da lernantoj, 12 302 privataj kun 2 736 913 da lernantoj. En 1927: 9 170 publikaj kun 3 659 580 da lern. k 11 533 privataj kun 1 975 832 da lernantoj.

Malgraŭ forta propagando la nombro da ekleziaj lernejoj malpliiĝis. Sed pli multe ankoraŭ malaltiĝis la vizitado de l'infanoj en tiuj lernejoj. En 1903 en ili estis 54,8 % el la infanaro, en 1919 nur 38,7 % k en 1927 nur 35,1 %. La angla ŝtat-eklezio havas 9 927 lernejojn kun 1 526 375 da lernantoj, la katolikoj havas 1 143 lernejojn kun 365 589 lern., la Vesli-sekto havas 135, la judoj 12 k aliaj grupoj kune 336 lernejojn.

En la subvenciataj katolikaj elementlernejoj ne estas permesate al pastroj instrui, nur kelktempe por provizore plenigi lokon.

Rilate tiun problemon **Francio** estas la plej pura k justa lando. Ekzistas publika lernejo tute pagata de la ŝtato k la privata lernejo, kiu havas nenian oficialan subvencion.

La instruado en la privata lernejo estas tute libera. Nenio estas reguligita laŭleĝe. La ŝtata inspektoro ne rajtas kontroli tiun instruadon, Li nur povas denunci instruadon, kiu ne konvenas al la oficialaj moroj k moralo, sed praktike li ne posedas rimedojn por konstati tion.

La publika lernejo estas neŭtrala rilate la religion. Religi-instruado, se dezirata, estas donata ĵaŭde, kiam ĉiuj lernantoj libertempas. El la tuta lernejaro 75 % estas publikaj k 25 % privataj. En kelkaj konservativaj k klerikalaj departementoj estas 50 % da privataj lernejoj.

La franca leĝaro malpermesas al pastroj instrui, sed per kelkaj rimedoj tiaj religiuloj lerte evitas obei la leĝon. Se ili posedas la unuagradan diplomon, ili povas eniri malaltgradan lernejon. Ili tiel sekularizas sin.

En **Belgio** la leĝo donas al ĉiu la liberon fondi lernejojn. Ekzistas: 1) Oficialaj lernejoj instalitaj de la ŝtato, provinco k komunumo. 2) Lernejoj instalitaj de la eklezio k akceptitaj de la komunumo. 3) Akcepteblaj lernejoj, subvenciataj de la ŝtato k de kelkaj komunumoj. 4) Tute liberaj lernejoj, malmultnombraj.

Por ricevi monsubtenon, la privataj lernejoj devas submeti sin al la „minimuma programo" k ŝtata kontrolo. La instruistoj devas posedi la diplomon akiritan en la de la ŝtato kontrolataj seminarioj. En la oficialaj lernejoj surprograme estas religio k moralo. Tiu instruado estas donata de pastro aŭ de instruisto, se tiu lasta pretas por tio. Lastkaze ĝi havas lokon sub eklezia kontrolo. Laŭpete infanoj povas esti liberigataj de tiu instruado.

La ŝtato pagas la instruistojn en ĉiuj akceptitaj k akcepteblaj lernejoj. La komunumoj, kiuj akceptas lernejojn, devas pagi la pliajn kostojn. El la infanaro 1/2 el la knaboj k 1/3 el la knabinoj vizitas la publikan lernejon. En katolikaj lernejoj ankaŭ instruas gemonaĥoj.

Laŭ holandaj raportoj kompilis S.A.

Rimarkigo k alvcko

Kie restas miaj karaj kunlaborantoj, K-doj Azorin, Grimer k Arbarulo, por doni artikolojn pri Hispanio ktp? Sendu ĉion nur al la nova adreso, citita ĉe la kapo de tiu ĉi Paĝo!

Ĉiuj Gekamaradoj,

kiuj interesiĝas pri la eldono ĉe SAT de instrua k kontraŭ la kapitalista monsistemo direktita verko de *G. Blumental:*

La liberigo de la mon- k interez-regado

kies tradukon jam pretigis *K-do Riĥ. Pförtner*, bonv. sciigi tion al la *Administrejo de SAT* en *Leipzig.*

La prezo estas *1.50* mk. g. Antaŭpagu por la verko!

La apero de la libro estos certigita, se 300 antaŭmendoj kun pago alvenos!

TRA ESPERANTIO

Demagogio k Blufo

Naskiĝis plia Internacio! IPE (Internacio de Proleta Esperantistaro) estas ja fondita per la bonvolo de 46 delegitoj de ? L.E.A. k ? U.K. (Unuigaj Komitatoj, nomo sendube uzata antifraze, ĉar anstataŭ unuigi ili faras ĉie disigan laboron). Kompreneble estis pli granda nombro da personoj por soleni tiun „historian“ okazintaĵon. Sed, laŭ la internaciisma sistemo, ili estis nur senrajtaj figurantoj. ...

Nature la delegitoj k figurantoj multe insultis al la „SAT-direkcia kliko“ k ili deklaris sin la solaj rrevoluciuloj en tuta Esperantio. Sendube estas nur maltrafa hazardo, ke ilia vidpunkto pri la signifo k rolo de esp-o tute koincidas kun tiu de la plej oportunisme neŭtralaj esperantistoj. En la gvidrezolucio oni ja legas:

„Esp-o laŭ klasbatala vidpunkto en la nuna periodo nur prezentas internacian helpan lingvon, kiu neniuokaze estas destinita kontraŭbatali la uzon de la naciaj lingvoj ...“

Tre trafa ankaŭ estas la maniero, laŭ kiu tiuj grandbuŝaj pseŭdorevoluciuloj intencas *unuigi* la proletajn esperantistojn:

„IPE plej akre plu batalos kiel kontraŭ oportunisma sennaciismo, tiel ankaŭ kontraŭ la reformisma ideologio de la social-demokratio, subtenantaj la imperialismajn rabadojn k militojn, kiuj plenumas la taskon deteni la laboristojn de klasbatalo k malhelpi la efektiviĝon de la ruĝa unueca (tiel!) fronto ...“

Eble la IPE-anoj deziras la unuiĝon, sed kondiĉe ke oni aprobu ĉion, kion ili senkompetente asertas. La katolika eklezio — ĉiuj eklezioj — volas ankaŭ la unuiĝon de la tuta homaro, sed la homoj devas unue genuiĝi antaŭ la papo k konfesi, ke li estas neerarpova, rilate al klarigoj pri la sankta skribo. La ideologio de IPE:

„estas la marksisma mondkoncepto, la dialektika materialismo.“

Sekve anarkistoj, ISK-anoj k.a. klasbatalantoj, kiuj ne tute konsentas kun tiu doktrino, aliĝi ne povas al la nova verda Internacio. Kaj, kiuj tamen akceptas la dialektikan materialismon, tiuj nepre devas havi pri ĝi komprenon saman al tiu de Stalin. Tia programo, ĉu ne vere? estas tre trafa por atingi la unuiĝon de ĉiuj proletaj espistoj. ... Ĝi nepre naskas en la spirito jenan dilemon: aŭ la IPE-fondintoj estas sinceraj, sed stultaj; aŭ ili estas eble inteligentaj, sed certe malsinceraj.

Nu, estus perdi tempon insisti pri tio.

Ni prefere menciu du tre signifajn faktojn: 1) En la prezidantaron elektiĝis la „veterano“ Raŭŝenbaĥ, tiu neŭtralulo, kiu antaŭ kelkaj jaroj iniciatis la starigon de „Domo de Esperanto“ en Gepersdorf (Göppersdorf) k multe reklamadis en la neŭtralaj rondoj k gazetoj por sia entrepreno — kiu kompreneble fiaskis! ... 2) Inter la fondintoj de la nova Internacio ŝajne mankis Bata. Almenaŭ en la tripaĝa (? — vi dubas, kara leganto, jes, la tuta raportaro pri tiu „historia“ okazintaĵo ampleksas nur 3 paĝojn de la *sespaĝa* „Isto“) raporto, kiun ni legis, vane oni serĉis la nomon de la eksredaktoro de „Isto“. Ĉu do estas ĝusta la famo, ke tiu K-do ne plu estas 100%-a ortodoksulo k eĉ devis forkuri el Sovetio, tial ke li kuraĝis ne ĉiam aprobi la dirojn k farojn de la „ruĝ-verda car' “ el Moskvo? ...

Demagogio, blufo k dogmismo neniam sukcesis daŭre progresigi movadon. La SAT-anoj estu do paciencaj k tute trankvilaj; ili iru sian vojon, la sola, kiu ebligas realan unuiĝon de ĉiuj tendencoj el la klasbatala esp-a movado.

RELIEFAJ OKAZINTAĴOJ.

Komence de novembro dum tuta semajno manifestaciis en Londono senlaboruloj, kunvenintaj el ĉiuj anguloj de Britio. Okazis multnombraj kunpuŝiĝoj kun la policistaro, kiu brute perfortis la batalantojn.

La verdikto de l'supera ŝtata tribunalo, kiu parte kondamnis kiel nepravigeblan la perfortan forpelon en julio de l'prusia respublikana registaro el socialdemokrataj k katolikaj ministroj, ne malhelpas la regnan kancelieron *fon Papen* plue estri komisare en Prusio. Tiu sinteno reestigis akran kontraŭecon inter la regna k la bavara registaroj (ĉar ĉi lasta timas perdi siajn aŭtonomajn rajtojn).

La intertraktadoj pri kontrakto de „reciproka neatako“ inter Sovetio k Rumanio ne progresis k spertis novan malhelpon per la rifuzo de l'pola registaro (kiu subskribis siatempe tiaspecan kontrakton) funkcii kiel peranto.

La korpo de l'plej granda kurierŝipo en la mondo estas surakvigita en Sankta Nazareto (St. Nazaire, Francio). Ĝi longas 313 metrojn (je 39 m pli ol la ĝis nun plej granda), havas volumenon de 75 mil tunoj (kontraŭ 56,6 mil de l'ĝis nun plej ampleksa); la rapido estos verŝajne je 30 nodoj (la nuntempe plej rapida ŝipego atingas ne tute 28 nodojn).

Ĉe la malarmada konferenco en Ĝenevo la franca registaro metas kiel kondiĉon por redukto de l'armado la unuecigon de l'tipoj de naciaj armeoj k ilian disponigon al la „Ligo de Nacioj“ por malebligi la eksplodon de militoj.

Ĉu klaskonscia laboristo?

Ĉi tiu rimarkigo aperas tiel malfrue, ĉar ĝi estis sendita unue en letero, kiu perdiĝis. — *Red.*

Kun granda miro mi legis la artikolon de Wiersma en Leeuwarden pri ferivizitoj (vd. n-on 392).

Li atentigas nin pri la „granda propaganda valoro“ de la ferivizitoj. Sed samtempe ĉi tiu persono kuraĝas malatenti siajn lokajn K-dojn!

Ĉu li neniam aŭdis pri la Göteborga Konvencio? Kial li ne povas transsalti la ridindajn malgrandaĵojn, pro kiuj li ne volas aliĝi? Kion li volas atingi per sia izoleco? En kio konsistas la „granda propaganda valoro“ de la ferivizito de niaj svedaj K-doj, ĉar nur li mem sciis pri tio! Nia konkludo sekve ne povas esti alia ol: Li akceptis niajn svedajn K-dojn por kontentigi sian lingvan konon. Tio estas egoismo!

H. Rijpstra (15 547).

Ĉe la parlament-elektoj en *Germanio* (6. XI.) perdis voĉojn la Hitler-a partio (196 deputitoj anstataŭ 230) k socialdemokratoj (121 anst. 133), gajnis la german-nacianoj (subtenantaj *fon Papen*) (51 kontraŭ 37) k la komunistoj (100 anst. 89).

Huver, la usona prezidanto de l'„prospero“, estas venkita en la elektoj de l'8. 11. de la „demokrato“ Rozvelt (Roosevelt).

Raportantoj, verku kiel eble plej objektive k vereme!

Mi volas doni kelkajn informojn, por ke vi iomete povu prijuĝi la skribmanieron de K-do F. G. v. d. Plank (16 794) en „S-ulo“ n-o 395, pĝ. 5-a, sub titolo: „Batalemo en la Nederlanda parlamento“. Ekz. la vortoj skribitaj de li: „For la reĝinon!“ tute ne estas uzitaj de la komunistaj parlamentanoj, eĉ la propra organo de la komunistoj („De Tribune“) ege kontraŭis la sciigojn tiurilatajn de la burĝa gazetaro. Nur la vortoj: „For la malsatdiktatorecon de Ruis-de Geer“ estas diritaj. El tiu ekzemplo ni jam povas kompreni, ke K-do 16 794 ne estas sufiĉe informita pri aferoj rilataj la kom. movadon. Ankaŭ la frazo: „Ĝis nun simila ago en Nederl. ne okazis“ estas tute erara k pruvas, ke K-do 16 794 ne konas la historion. Jam en 1921 dum la Grunendal-agitado (militrifuzanto) kontraŭmilitaj virinoj faris la samon k kriis: „Ni postulas la liberigon al Hermano Grunendal el karcero“. Inter la vokantoj estis la nepino de l'liberpensulo Douves Dekker, fame konata sub la pseŭdonomo „Multatuli“.

Pro tio ni estu atentemaj rilate la asertojn de K-do v. d. P. en la nomita n-o k prenu unue eron da salo, por ĝuste prijuĝi la aferon. *16 459.*

Ĉe la Laboristaj Esperanto-Asocioj.

La disvolviĝo de la movado en Norvegio.

Ankaŭ en Norvegio ni povas konstati kreskantan intereson por nia movado; ni daŭre antaŭenmarŝas post iom da ripozo, kies kaŭzo estis krizo, senlaboreco k sekve mizerego de l'laboristoj. Longtempaj senlaboruloj preskaŭ ĉesas pensi, tute indiferentiĝas; tio estas plej danĝera por lab. organizoj, k ankaŭ la esp. movado tial iom malfortiĝis. Feliĉe la homoj ŝajne revekiĝis; oni rimarkas ĉi tie multe pli viglan k konscian laboradon ol antaŭe.

Somere vizitis nin kelkaj eksterlandaj K-doj, kiuj helpis nin en la propagando. La 23. aŭg. faris sveda esp-isto Stahberg provlecionon en Popoldomo: 20 personoj aliĝis kurson 4-semajnan, okazantan en 5 tagoj semajne, antaŭ- k posttagmeze. La 26. sept. komenciĝis nova kurso kun 40 p., funkcianta dum tri tagoj semajne (antaŭ- k posttagmeze). Samtempe komenciĝis daŭriga kurso dufoje semajne vespere. Ni tiel intencas daŭrigi ĝis la printempo. Aranĝanto estas LEA. K-do Stahberg instruas laŭ Ĉe-metodo por komencantoj, laŭ „Petro“ por progresintoj. Plej multaj lernantoj estas organizitaj, aktivaj laboristoj; ĉiuj montras plej grandan intereson.

Rimarkinda fakto estas, ke nunjare oni renkontis nin kun multe pli da komplezemo k komprenemo. Nia ĉefa gazeto „Arbeiderbladet“ akurate aperigis niajn raportojn, ekz. pri la SAT-Kongreso antaŭ k post la okazo. Lab.-organizaj estraroj komencas interesiĝi; ni ricevis aŭtune pli ol 20 petojn de div. unuiĝoj pri novaj kursoj, kiujn ni parte kapablis kontentigi. Krom grandaj kursoj en Popoldomo funkcias nun 6 aliaj (etgrupaj) inter fakorganizoj. K-doj E. k M. Sundsby gvidas 4 kursojn; en tramista esp. klubo K-do Snekvik gvidas novan kurson, inter lignaĵistoj k fajrobrigadistoj post nelonge komenciĝos kursoj. Sufiĉe da laboro por la tuta vintro!

Certe preskaŭ ĉiuj lernantoj aliĝos al LEA, grandparte ankaŭ al SAT. Printempe okazos ekzameno; k, se eble, kurso por kursgvidantoj, tia, kian lastjare gvidis K-do Muribo kun 20 partoprenantoj.

Alia ĝojiga afero estas, ke ni ricevas materian helpon de „Lab. Kleriga Asocio“, ekz. senpagan ejon por la unua k por la antaŭtagmezaj kursoj. Ĉi tiu Asocio organizas ankaŭ nian korespondan kurson. Ni ŝuldas al ĝi sinceran dankon, ĉar sen ĝi la esp. movado en Norvegio neniel progresus.

16 788.

Skismuloj volas ŝteli la titolon de F. E. O.*)

En „Proleta Esp-isto“ k ankaŭ en „Isto“ la IPE-anoj kriaĉas pri la fakto, ke la estraro de F.E.O. decidis ŝirmi sian organizan titolon kontraŭ uzurpo de l'skismuloj k tiuokaze estis devigata minaci per leĝa devigo en okazo de rifuzo. Ne nur la sekretario de F.E.O., K-do Kaŝon (Cachon), sed eĉ K-do Lanti, kiu tute ne estas estrarano de FEO, estas aĉe insultataj en IPE-organoj.

Kie do estas la plimulto de FEO, k kie estas la uzurpuloj? — Sufiĉas jenaj konstatoj: Depost la Nansi-a FEO-Kongreso (printempo 1931), kie la tiamaj opoziciuloj, nunaj IPE-anoj, malvenkis, ricevante nur 238 mandatojn kontraŭ 415 m. por la estraro, — tiuj uloj senskrupule k furioze agitadis por la skismo. Unu jaron poste, ĉe la Brusela Kongreso de FEO (vd. artikolon en la n-o 386 de „S-ulo“), la raporto de l'estraro estis aprobata per 433 mandatoj; malaprobis ĝin nur 36. Kvar aŭ kvin *nerealiĝintaj* personoj aplombe asertis en tiu Kongreso disponi pri 530 mandatoj, dum fakte nur *200* eks-anoj nereaniĝis al FEO! . . .

Eksiĝintoj (k kelkaj eksigitoj) faris sian propran „kongreson“ en Grenoblo kelkajn semajnojn poste, nomante tiun kunvenon „regula kongreso de FEO“. Per tiu rimedo ili provis pravigi la nepagon de l'ŝuldoj de opoziciaj grupkasistoj al la centra kasisto.

Kaj ili daŭrigis misuzi la Asocian titolon por sia propagando, ĝis tia grado, ke ili imitis eĉ la presliterojn uzatajn kutime de la Asocio en siaj presaĵoj!

Tiu misuzo estas tiom pli senhonta, ke en la vera FEO oni apenaŭ rimarkas la foreston de la skismuloj: FEO prosperas; ĝiaj grupoj vivas k pligrandiĝas. Estas do tute kompreneble, ke ni neniel povas permesi al la titol- k monŝtelantoj, ke ili daŭrigadu malutili nian Asocion, sin ornamante per fremdaj plumoj. La kriaĉado pri „alvoko al la ĝendarmoj“ cetere tre malbelsonas en la buŝoj de samideanoj k aprobantoj de personoj, kiuj per la vojo de la presejo „Neŭdrag“ en Lajpcig ne nur minacis al SAT per la burĝa juĝistaro, sed efektivigis sian minacon: ja nur per lastmomenta kolekto de la bezonata mono (dank' al pruntoj de div. K-doj) estis evitate, ke sukcesis la manovro de l'IPE-anoj k ke oni vendu aŭkcie la havaĵon de SAT en Lajpcig al . . . la IPE-ŝtelistoj!

La Direkta Komitato de F.E.O.

[1] Fédération Espérantiste Ouvrière (Franclingva LEA).

Parolu kun viaj Kamaradoj

en via grupo pri antaŭmendo de:

Paul Neergaard:

Fremdvortoj en Esperanto

(pago ĉe apero: 1 dana kr. = 0,80 g. m.) pri la 15-a regulo en teorio k praktiko. Per starigo de kelkaj principoj la aŭtoro kunigis k sistemigis la diversajn konsiderojn, kiujn oni devas fari, kiam oni havas la taskon elekti la ĝustan formon por nova esperanta vorto. Kritika analizado laŭ la starigitaj principoj de centoj da esperantaj vortformoj.

Plivalorigu la sciencan bibliotekon de SAT

Mendu ĉe la presejo:
Dates Bogtrykkeri, Gl. Kongevej 13, Kopenhago V. Danio.

Korekto. *En la n-o 396, p. 13, bonv. korekti gravan preseraron: la Ĝen. Voĉdonado okazas laŭ paragr. 27, alineo c) de la Statuto (ne 37!).*

El la urbo de la naŭa SAT-Kongreso

Jam de longe la SAT-anaro nenion legis pri la esp. movado en Lajpcigo, kie ĝi relative estis tre forta. Kaj tion ja pruvis la grandiozaj kongresaranĝoj k la multnombra kongresvizito. Ankaŭ niaj aranĝitaj esp. kursoj en 1929 montris tre kontentigan rezulton. Ĝojigis nin la fakto, ke ĉiuj kursoj estis bone vizitataj k la partoprenintaro kreskis ĝis pli ol 500 personoj.

La tempo pasis k kun ĝi ankaŭ la harmonio en la iame forta laborista esp. grupo. Partipolitikaj pasioj venkis super la prudento k la konsekvenco estis skismo, k skismo signifas, speciale por la laborista esp. movado, reiron k stagnon. Estas ja vere, ke unuigita laboristaro estas nerompebla remparo kontraŭ la unuigita burĝaro k tiom pli ĉi tiu unueco estas necesa ĉe la laborista esp-istaro kontraŭ la indiferento. Ĉiu esp-isto, kiu jam aktive laboris en la esp.-movado scias, kiel malfacile estas akiri novajn adeptojn al nia movado. Multaj Gek-doj forlasis niajn vicojn sole pro la disputaĉoj. Kaj ĉe kelkaj la partifanatiko estas en plej alta stadio, pro tio ili apenaŭ povas saluti siajn klasfratojn. Konduto, kiu parencas al kretenismo.

Ekzistas nun en Lajpcigo 2 esp. lab. grupoj t. e. la GLEA-grupo k SEA-grupo, krome kunvenas monate unufoje la SAT-rondo. La unua grupo

kiel eble plej evitas ian kontakton kun la SAT-rondo. La dua grupo rilatas amikece kun ĉi lasta k rekomendas al siaj anoj la viziton al nia diskutvespero. Ŝajnas, ke la ondoj de ĉagreno denove glatiĝis k la grupoj povas normale funkcii.

Sekvantaj linioj montru al ni la fruktojn de la aŭtuna varbado poresperanta. Komence de oktobro la loka grupo de SEA aranĝis 13 kursojn en la urbo kun partoprenantaro de **398** personoj (308 viraj k 90 virinaj). La diversaj kursoj varias inter 13 k 46 partoprenantoj po kurso. Reprezentataj estas gelernantoj, metilernantoj el la plej diversaj metioj k plenkreskuloj. Sindikatanoj estas 242 el 31 sindikatoj. Al la sport-movado apartenas 80. Al aliaj lab. organizoj apartenas 157. Lingvajn antaŭkonojn havis: esp-a 38, angla 80, franca 47, dana 1, latina 12, hispana 3, rusa 4, holanda 1, pola 2, slovaka 1, itala 2, greka 2, serba 1, hebrea 1, portugala 1. Interese estas ekscii, kiel la kursanoj estas atentigataj pri la esp. kursoj. Al ĉi tiu demando respondis 89 %. Ni citas tion, por ke niaj K-doj vidu, kiu varbmaniero pleje efikis:

Varbitaj per flugfolioj	56
Varbitaj per Lajpciga Popolgazeto (soc. dem.)	83
Varbitaj per demokrata gazeto . . .	9
Varbitaj per afiŝoj (en kooperativoj, sportejoj ktp.), *ne* per afiŝoj sur afiŝkolonoj	121
Varbitaj per sindikatoj, unuiĝestroj, paroladoj k de buŝo al buŝo . . .	111

La lab. esp. grupo (GLEA) malfermis siajn kursojn fine de septembro. En la tuta urbo oni aranĝis 7 kursojn kun partoprenantaro de **109** personoj. Krome funkcias 2 konstantaj esp. kursoj en MASCH (Marksista Laborista Lernejo); 1 por komencantoj, la alia por progresintoj kun meza kvanto da vizitantoj.

En Vegetara unuiĝo funkcias unu kurso por komencantoj (10 pers.) k 1 por progresintoj (10 p.). En 2 vilaĝoj proksime de Lajpcigo K-do Dietze (15 055) aranĝas 2 kursojn kun proks. 35 partoprenantoj.

La SEA-grupo baldaŭ aranĝos infankurson kun ĉ. 25 infanoj. La neŭtrala esp-grupo de Lajpcigo aranĝas infankursojn por 13–14-jaraĝaj infanoj. Anoncis sin 250 infanoj el 12 lernejoj.

La atentindan sukceson de la SEA-grupo ni sendube povas skribi al la kontoj de K-doj Lässig (17 313) k Loeffel (17 734), kiuj kapablis fari tre bonan poresperantan propagandon.

Observanto.

Pri korespondantoj kun sovetiaj Kamaradoj

Sekve de la samtitola artikolo en la n-o 395 ni ricevis la sekvantajn skribaĵojn:

„Foje mi sendis „S-ulo“n al USSR k ĝi estis ricevata bone de la tieaj K-doj. Tamen ĉie en Sov. esp-rondoj oni propagandas kontraŭ SAT, k mi skribis longajn leterojn al K-doj, kiuj ŝajne neniam legis nian ĵurnalon. Laŭ unu el miaj korespondantoj, Lanti estas pli perfida ol la „kristana“ diablo. Mi estas subtenanto al la revolucio k estas al mi granda bedaŭro, ke la sovetiaj K-doj scias preskaŭ nenion pri la vera stato de aferoj ekstersovetiaj. Unu fakte skribis al mi, ke mi ne komprenas la signifon de la lab. movado en Britio – ĉar mi esprimis al li la opinion, ke la laboristaro en Anglio bedaŭrinde ne estas revoluciema!“

Varley (17 040).

*

„Mi priparolis la aferon kun kelkaj SAT-anoj; ili ne kontraŭparolis la eblon korespondi kun sovetiaj K-doj, sed ili faras tion *per blankaj kovertoj*. Ankaŭ estis K-do, kiu sendis rekomenditajn leterojn, sur kiuj troviĝis la nomo de SAT, sed li tute ne ricevis respondon. La unuan fojon li gajnis dudek kvin guldenojn, ĉar la poŝta direkcio pagas tiun sumon por perditaj rekomenditaj leteroj. La duan fojon la direkcio rifuzis pagi la sumon, ĉar ĝi ne povas esti responda pri rekomenditaj leteroj destinitaj por Sovetio.“

Fred. Ples (Amsterdam).

*

Ni ricevis ankaŭ aliajn leterojn el K-doj, kiuj sciigas pri la rimedoj, kiujn ili uzas por korespondi kun niaj sovetiaj amikoj. Kompreneble tiajn leterojn ni ne publikigas.

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Ĉeĥoslovakio. La 9. okt. estis fondita en *Aŭsig* (Aussig a. E) la „Ĉeĥoslovaka Laborista Asocio Esp-ista“ (ĈLAE). Aniĝi al la Asocio povas ĉiu lab. esp-isto, kiu estas ano de la socialdemokrata partio, de iu libertendenca sindikato aŭ kultura lab. organizo aŭ kiu ne kontraŭas la lab. movadon. Adreso de la sekretario: Tischer Fr., *Aussig*, Lange Gasse 38, Ĉeĥosl. – **Germanio:** *Renkontiĝo de GLEA-distrikto „Orient-Saksio“*. Ĉ. 80 geesp-istoj kunvenis en la vilaĝo Steinigtwolmsdorf, apud la ĉeĥa limo. Publika vespero estis ĝenerale sufiĉe efika por la varbado. Ĉefan propagandvaloron havis la spektakloj de la Agitpropgrupo Dresden k parolado de K-do Müller (Dresden). Je 2.10. komenciĝis distr. konferenco. Unue K-do Haselof montris en sia raporto la kreskon de l'distrikto lastjare de 460 al 591 membroj. Tiu bonega rezulto montras, ke la taktiko de l'Orient-saksa LEA-distrikto estas ĝusta, nome ke ano de la distrikto povas ankaŭ esti ne-LEA-anoj. Per tio inter la grupoj regas pli da libero k harmonio ol ĉe deviga membreco al asocio. Kaj kiuj ekkonis la bonon de la organizo, tiuj memvole membriĝos k pli entuziasme batalos por ĝi. La LEA-estraro ja ne aprobas la strukturon de nia distrikto k eĉ jam provis forigi K-don H. de sia posteno, ĉar laŭŝajne li ne sufiĉe „komuniste“ (?) agas, sed la distr. membraro plene konsentas tiun taktikon, kion la konferenco denove pruvis. K-do Ĉerper (Meissen) dum unu horo detalege raportis pri la IPE-kongreso en Berlin, kie denove la malnovaj insultoj k kalumnioj al SAT k ties gvidanto Lanti elmontriĝis. Poste K-do Pförtner (Sebnitz) koncize raportis pri la SAT-kongreso. Post la raportoj pri ambaŭ kongresoj estiĝis sufiĉe vigla diskutado, kiun partoprenis 13 Gek-doj k kiu montris malaprobon al la taktiko de l'IPE-anoj; nur du el la parolintoj provis pledi por IPE. Niaj K-doj do sufiĉe respondis al la atakoj kontraŭ SAT. Ĝenerale la konferenco montris, ke ne ĉiuj LEA-anoj plene konsentas kun la taktiko de la LEA-estraro. *6707.*

EKSTER NIA MOVADO

La Flandra Ligo Esperantista sukcesis interesi pri esp-o la Flandran Turistan Asocion (125 000 m.), kiu presas en sia bulteno esp. kurson. Sekve de tiu propagando en div. lokoj estas malfermitaj kursoj sub la aŭspicioj de tiu Asocio.

La Norvega Esp-ista Ligo aranĝis kurson en Hamar (gvidas d-ro Fiŝer) kun 100 p., en Oslo (70 p.), Lilliström (25 p.) – gvidas H. Seppik el Estonio; en Trondheim k Lillehammer kursoj de d-ro Fiŝer.

En Kiev (Sovetio) okazis peresp-a Ekspozicio de „Oomoto“ (religia movado), kiun vizitis (laŭ foto enpresita en la nov. n-o de „Oomoto Internacia“) eĉ lernejaj infanoj...

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Esperantlingva Novelbiblioteko, *redaktata de* Leono Vienano, n-o 4. Eldonejo: N. Szapiro, *Warszawa*, Novolipki 8. Form. 19 × 13; 32 paĝoj. Prezo: 0.45 sv. fk.

Ĉi tiu kvara numero de la *Novelbiblioteko* enhavas du ĉarmajn noveletojn: *Fraŭlino Ida* k *La Vojo malsupren*. La unua rakontas pri bela, juna instruistino, kiu pasie amas sinjoron Jovanoviĉ, la bienadministranton; ĉi tiu volonte ŝin edzinigus, sed ŝi ne estas sufiĉe bonhava. Nu, iun tagon, jen la juna Ida fariĝas subite riĉa per la morto de sia onklo, de kiu ŝi heredas 70 mil florenojn, k tiam ŝi ankaŭ subite ĉesas ami la monavidan administranton.

La *Vojo malsupren* montras al ni, kiel iu junedzino, pro amo al la lukso, falas iom post iom en mizeron k kiel ŝi fine, pro malsato, sin prostituas kun la konsento de sia kompatinda edzo.

Kvankam moraligemaj, ambaŭ noveloj estas tre legindaj; la stilo estas simpla, flua, tre korekta, pro kio ni devas nepre laŭdi la tradukinton. *H. B. (L. K.)*

Novikov-Priboj: La submarinistoj. Trad. E. Blinov. Ekrelo, Leipzig. 1932. – 115 paĝoj. Form. 11½ × 16. Prezo: 1.20 mk.g.

Personajn memorojn pri la marista vivo dum la mondmilito la aŭtoro plektas en romanforman priskribon, en kiu iafoje estas reliefigita la sensencaĵo de la buĉado. La stilo estas ne ĉiam facile digestebla; precipe la kruda lingvaĵo de l' dialogo ne estas libera de rusismoj. Tio estas cetere iel pardonebla, ĉar la traduko devas ja respeguli fidele la atmosferon de l' originalo; sed ne pardonebla estas la konstanta malkorekta uzado de la artikolo „la“ tie, kie ĝi ne devus esti aplikata! Estas ankaŭ kelkaj aliaj stultaĵoj: „gidroplano“ (anst. hidroplano), pompo (en la senco de pumpilo!), libro *arestita* (anst.: *konfiskita!*), k neklarigitaj neologismoj.

N. B.

Totsche Ludoviko, De Paĝo al Paĝo. Literaturaj profiloj. Eld. Literatura Mondo, Budapest. 1932. – 120 paĝoj. Form. 15½ × 20. Prezo: 0.50 dol., bind. 0.80 dol. Literaturaj kritikoj pri diversaj nuntempaj esperantaj aŭtoroj.

Ŝlosilo de Esp-o por araba lingvo. 75 pĝ. Form. 8×11 cm. Eld. Fahim Harfouche, 33, Eugenie St., Port Said. Prezo: 20 milimoj aŭ –/5 aŭ egalvaloro.

Ludv. Puff: La moderna Esperanto-kurso. Eld. Socialista Esp. Asocio por la germanl. regionoj, Frankfurt-M. 21. — 112 pĝ. Form. 12×17 cm. Prezo ne indikita.

Se oni konsideras, ke tiu ĉi libro ĉefe volas esti gvidilo por kursgvidantoj, oni povas konsenti pri ĝia aranĝo. Ĝi ja instruas, kion instruanto laŭ rekta metodo devas fari: prezenti al la lernantoj vortmaterialon pri konkretaĵoj (por instrui *perbilde* k *perobjekte*); per demandado paroligi ilin; per formado de kompletaj frazoj kutimigi al esperanta vortordo, samtempe ripetante la lernitaĵon. Ankaŭ en rektmetoda kurso la lernanto ja ne povas kontentiĝi pri nuraj krajonaj notoj, sed deziras presitan gvidilon k memorigilon.

La sekvantaj malkorektaĵoj devus esti korektataj en dua eldono: p. 9, deskribi (devas esti: *kopii* aŭ *transskribi*); p. 36, iri en liton (d. e.: *enlitiĝi*); p. 55, banas (d. e.: *banas sin*); p. 66, 67, 70, majstro (d. e.: *mastro*); p. 69, kvankam kio (d. e.: *malgraŭ kio*); p. 71, karesi kun (d. e. *karesi la .. n)*; p. 82. la „Senn. Asocio Tutm.“ (d. e. sen la artikolo).

N. B.

RADIO-PROGRAMO:

17. novembro:

19.30—20.00 Ljubljana, 576 m — leterkesto en esp-o k a. lingvoj.

21.20—21.40: Kaunas, 1935 m, parolado.

22.00—22.30 Minsk, 700 m — Nova vilaĝo. (samhore: la 20. 11. pri nacipolitiko en BSSR; la 23. k 26. 11.)

22.20—22.30: Breslau/Glajvic — Esp-o por laboristoj.

18. novembro:

23.15—23.30: Lisboa CTIAA, 31.25 m — informoj.

19. novembro:

18.30—18.45: Zagreb, 307,1 m — Esp-o k praktiko.

21.20—21.30: Lyon-la-Doua — Estonta homo (la 26. 11. la sekvo).

27. novembro:

18.00—18.30: Tallinn, 298 m, Tartu — Estona agrikulturo (prof. Kopp).

NIA POŜTO

16 652. — Via materialo estos uzata.

10 662. — La 2 noveloj estas uzindaj en „LNE“; ni uzos laŭeble en iu el la venontaj kajeroj.

Atentu!

La Soc. Sekcio de Lajpcigo-Oriento aranĝos la 16-an de dec. 1932 letervesperon. Bv. sendi L, PI, gaz., ktp el ĉ. landoj. Resp. nepre gar. — Kolektiva koresp-ado dezirata. Adr.: K-do Werner Hönemann, Wurzner Str. 148, *LEIPZIG O 5*, (Germ.)

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo“:

De Fakkel, Amsterdam, 18. 10. (unua somerlern. en Hisp.); *Der Funke*, Berlin, 2. 11. (Esperanto — la unua lingvo en A.B.F.).

Prisper. artik. k notojn enhavis:

L'*Effort*, Lyon, 1. 10., *Le Contre-Poison*, St. Céré, okt., *ITF-Bulteno*, okt., *Arbetaren*, Stokh., 17. 10. (rubr.), *De Fakkel*, Amsterd., 22. 10., 29. 10. (rubr.), *Signalen*, Stokh., 27. 10., *Münchener Post*, 4., 7., 17., 18. 10., *Fränk. Volktrib.*, Bayreuth, 5., 15., 24. 8., 5., 6. 9., 11., 17. 10., *Tourisme*, Antverp., n-o 9, *Unidade*, Lisbono, 5. 10., *Der Funke*, 5. 11.

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Signalen, Stokh., 20. 10.

Peresper. materialon enpresis:

Aufstieg, Stuttgart, nov.

Tarifo de SAT

Lando	Kotizo por: a) aktiva	b) aspiranta c) subtenanta	Aliĝmono al SAT	Abono al: Sennaciulo	Abono al: „LNE“
Argentino, pes.	6.50	2.—	—.50	6.—	2.—
Aŭstrio, ŝil.	13.—	3.—	—.50	12.—	4.—
Belgio, belg.	13.—	3.—	—.50	12.—	3.—
Britio, ŝil.	10.—	3.—	—.50	9.—	3.—
Ĉeĥoslovakio, kr.	60.—	15.—	3.—	55.—	20.—
Danio, kr.	10.—	2.—	—.50	8.—	3.—
Estonio, kr.	8.—	1.50	—.25	7.—	2.50
Finlando, mk.	85.—	18.—	4.—	80.—	25.—
Francio, fr.	40.—	12.—	2.50	35.—	15.—
Germanio, mk.	8.—	2.—	—.50	7.—	2.50
Hispanio, pes.	15.—	5.—	1.—	13.—	7.—
Hungario, peng.	10.—	2.—	—.50	8.—	4.—
Jugoslavio, din.	110.—	25.—	6.—	100.—	40.—
Latvio, lat.	10.—	2.—	—.50	8.—	3.—
Litovio, lid.	18.—	4.—	1.—	15.—	6.—
Nederlando, guld.	5.—	1.50	—.30	4.—	2.—
Norvegio, kr.	10.—	2.—	—.50	8.—	3.—
Polio, zlot.	15.—	3.—	—.80	12.—	5.—
Portugalio, esk.	45.—	10.—	2.—	40.—	12.—
Svedio, kr.	10.—	2.—	—.50	8.—	3.50
Svisio, fr.	10.—	2.50	—.50	8.—	3.50
Usono, dol.	2.50	1.—	—.25	2.—	1.—

Ĉiuj ne cititaj landoj pagu laŭ la tarifo por Francio.

Rimarkigoj:

Ĉiu aktiva membro rajtas pagi sian kotizon al SAT per kvaronjaraj partopagoj. Tiucele SAT eldonis por 1932 apartajn kvitancmarkojn. En la jara kotizo de aktiva membro estas entenata la abono al Sennaciulo. Tamen nur tiu rajtas ricevi la Jarlibron, kiu komplete pagis sian aktivan kotizon.

La jara kotizo de b) k c)-kategorioj estas pagenda per unu fojo.

Ĉiu novaliĝanto nepre devas pagi la aliĝmonon al la Asocio, por kiu ni liveras apartan kvitancmarkon. Malnovaj membroj, kiuj intermitis la membrecon dum unu jaro, same devas pagi la aliĝmonon, tamen en tiu okazo ili ricevas siajn malnovajn matrikulojn.

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

ĈEĤOSLOVAKIO

Lab. Esp. Grupo koresp. kĉl, L, PI, pri ĉt., indiv. k kolekt. Resp. gar. Adresu: K-do Jos. Bergmann, *Reinowitz 226.* (ap. Gablonc a. N.).

K-do Valenta Karlo, (20 j.), *Nyrany 330 ap. Plzen*, koresp. kĉl.

DANIO

K-do Johannes Elneff, Absalonsgade 44/II., *Odense*, kĉl, pri ĉ. temoj.

FINLANDO

Proletoj helpemaj en tutmondo! — Multaj el miaj K-doj, kiuj pro sia pol. agado restadas en malliberejo volus entusiasme pli perfektiĝi. Bv. pere de mi sendi esp. gaz., lernolibrojn ktp. Adr.: Paŭlo Balto, Kauppapuist 23, *Vaasa.*

FRANCIO

Junulo dez. kor kĉl. pri ĉt. Adr.: Pagés, *Plaissan*, Hérault.

GERMANIO

Kelkaj Wuppertal-anoj koresp. kĉl, prefere kun Belgio k Nordfrancio. Skribu al: K-do Karl Gruber, Wilhelm Rabe Weg 34, *Wuppertal-E.*

NEDERLANDO

Rotterdama Rondeto koresp. kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata. Adr.: M. Gerritsen, Kegelstr. 22-a, *Rotterdam.*

Adresŝanĝo. — Korespondantoj atentu, ke mia adreso ŝanĝis. Ĝi nun estas: M. Demmenie, 3-e Oosterparkstr. 17/III., *Amsterdam (O).*

PORTUGALIO

K-dino Blandina Vinagre (naturistino), R. S. Bento 238 — 4°, *Lisboa*, kun eksterl. K-doj pri ĉt., escepte politiko k religio.

SOVETIO

K-do Turĉenko I., Hutor Meĵevoj hoz., *Kolĥoz imeni Ŝevĉenko*, kor. kĉl. pri ĉt. *Rykovo*, Donbass.

K-do M. Vinogradov, Sorokina str. 19, *Kalinin 2*, Moksv. obl., dez. seriozan korespadon kĉl pri lab. movado, politikaj k kulturaj temoj.

Gek-doj Vera k Jurij Weinbaum, stud. konstruinst., stenogr., Engelsstr. 10, *Baku*, kĉl.

SVEDIO

Gek-doj, skribu al ni, vi certe ricevos resp. Ni priskribas prol. k. a. temojn. L, PI, kĉl. Adr.: Ivar Eriksson, *Torshälla 71.*

Ni aranĝos la 3. 12. letervesperon k ekspozicion. Bv. alsendi PK k div. materialo. Ni certe resp. Adr.: Esperanto-Klubo, Hilding Sundberg, Rösgatan 23, *Amal.*

Nia klubo aranĝos letervesperon, la 27. 11. Bv. sendi L, PK el ĉ. landoj. Resp. garantiata. Adr.: Esperanto-Klubo, *Gumhojden.*

Ĉu vi konas la verkon de

LEONARD NELSON

la plej eminenta filozofo moderna? Li ne nur rekondukis la filozofion el la sfero de fantazio al severe scienca fundamento, sed ankaŭ donis al la klasbatalo novan firman sciencan fundamenton per la filozofio de l' Rajto. Skizon pri lia verko donas al vi la nova numero 16, okt.-dec. de

ISK

Mendu ĉe IVA-komandito Berlin S 14, Inselstrasse 8a. Prezo: -.25 mk. g. aŭ internacia respondkupono por numero, inkl. afr.

ENHAVO

	paĝo
La nuna stato de l'Japanaj kamparaninoj	19—20
Epedemio de konferencoj	20
Faŝistaj provokoj en Vieno	20—21
Letero el Norda Afriko	21—22
Nombroj parolas	22
La mizero de l'senlaboruloj en Germanio	22—23
Spertoj de patro, ...	23
Pedagogia paĝo	24
Tra Esperantio	25—28

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)